

BRAZILA ESPERANTISTO

48-A JARO

JULIO-AUGUSTO 1954

N.º 484-485



SÃO PAULO

Parta vidaĵo de
praça da Repú-
blica (placo de la
Respubliko).

—::—

La granda brazi-
la urbo festas en
ĉi tiu jaro sian
4-an jarcenton.

JULIO-AUGUSTO 1954

QUOTA ANUAL DE ADESAO A LIGA
BRASILEIRA DE ESPERANTO

N.º 484-485

48-a Jaro

BRAZILA ESPERANTISTO

(«O Esperantista Brasileiro»)

Oficiala organo de

BRAZILA ESPERANTO-LIGO

Societo de publika utileco, laŭ registara dekreto N. 4356, 26 Oktobro 1921

Direktoro:

A. CAETANO COUTINHO

Respondeca redaktoro (redactor principal):

D-ro CARLOS DOMINGUES

Administracio kaj Redakcio:

Praça da República, 54, 1.º

Telefona: 42-4357

Sidejo de la Brazila Societo de Geografio

RIO DE JANEIRO — BRAZILIO

Senpaga por anoj de B. E. I.
Eksterlande: unu dolaro aŭ 15 respondkuponoj

(De akordo kom la Eŝtutulos todos os membros são automaticamente filiados à organização mundial)

	Cr\$
Membro Simples: recebe a carteira de sócio, os cupões de serviço e o «Brazila Esperantisto»	40,00
Membro com direito ao Anuário: recebe o mesmo que o antecedente e mais o Anuário do movimento esperantista	70,00
Membro Assinante: recebe o mesmo que o antecedente e mais a revista "Esperanto"	150,00
Membro Mantenedor: recebe o mesmo que o Membro Assinante	250,00
Patrão: recebe o mesmo que o Membro Assinante	1.500,00
Membro Vitalício: recebe o mesmo que o Membro Assinante	3.000,00

Tôdas as importâncias devem ser remetidas em cheque bancário ou vale postal à

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO**PRAÇA DA REPÚBLICA, 54, 1.º****Rio de Janeiro, DF.****SAG-EROJ**

La mensogo estas la armilo de la malfortuloj.

Estu sklavo de la vero; kiu estas sklavo de la vero estas libera homo.

(Araba proverbo).

La vera kuraĝo ne estas: ne havi timon, sed: venki timon.

Morala kuraĝo estas pli malofta ol korpa kuraĝo.

Morala kuraĝo karakterizas la plej altstaran homon: la kuraĝo por serĉi kaj diri la veron, la kuraĝo por esti justa, la kuraĝo por esti honesta, la kuraĝo kontraŭstari tenton, la kuraĝo por fari sian devon.

Vera kuraĝo ne faras ekspozicion; tiuj kiuj volas impresigi timon ŝajnas konfesi per tio, ke ili estas malkuraĝuloj.

(Emerson)

Por pensi logike kaj konsekvence, ne nur menso estas necesa, sed ankaŭ morala kuraĝo.

(Elektis kaj tradukis Drs. F. R.)
(Flandra Esperantisto, Sept. 1952)

BRAZILA ESPERANTISTO

N.º 484-485

JULIO-AUGUSTO 1954

48-A JARO

PRI LA NECESO PLIFORTIGI LA NACIAN KAJ PER GI LA INTERNACIAN MOVADON

TEZO APROBITA DE LA XIV-a BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

Karaj gesamideanoj:

«Mi, subskribinta, promesas, ke mi lernos la lingvon internacian de D-ro Esperanto, se estos montrite, ke dek milionoj da personoj subskribis tiun saman promeson.»

La supra deklaro estas farita ne hieraŭ, kaj estas subskribita ne de ni. Tamen ĝi konservas ankoraŭ nun la saman aktualecon, kiun ĝi havis antaŭ 66 jaroj. Cetere ni mem (kaj eble multaj el niaj geamikoj) povus ja por la pureco de la lingvo subskribi senkondiĉe tiun asertaĵon sugestitan de Zamenhof antaŭ pli ol ses jardekoj. «Mi promesas, ke mi lernos la lingvon internacian...»

Gesinjoroj:

Vi scias, ke la deklaro, kiun ni ĵus citis, estis modelo de promeso, kiun en 1887 Zamenhof presigis kaj dissemis tra la mondo kun la Unua Libro de Esperanto. La ricevintoj de la Libro devus subskribi tiun deklaron, kaj ĝin resendi al la aŭtoro de la nova lingvo.

Ni vidas, ke la atento de la Majstro estis fiksita sur du gravaj punktoj: unua — la ekzisto de

10.000.000 da adeptoj; dua — la lernado de la lingvo. Sed, kvankam, laŭ la subskribota deklaro, li kondiĉigis la lernadon de la lingvo, tio estas, la ekziston de la lingvo, al la ekzisto de popolo, vi scias, ke tiuj du flankoj de la demando sin interdependas, sin interpenetras. Popolo ne povas esti sen lingvo, lingvo ne povas vivi sen popolo. Kiam temas pri la tiel nomataj «naturaj» lingvoj, ni rimarkas la homon antaŭanta la lingvon: naskiĝas infano, poste venas al ĝi la lingvo. Pri Esperanto, ĝis nun kaj ankoraŭ dum longa tempo okazas la inverso: la lingvo venas antaŭe al homo, poste li naskiĝas en Esperantujon, fariĝas ano de Esperanto-Popolo. Tiu regulo tamen, bedaŭrinde, ne estas absoluta, ĉar ni vidas ĉiutage naskiĝi kaj morti en Esperantujo homojn, kiuj neniam ricevis la lingvon. Aliaj, multe pli nombraj, tre alta plejmulto, kontraŭe, ricevas la lingvon, sed mortas ekstere — paradokse — mortas ne naskiĝinte...

Laŭ meznombraj statistikaj ciferoj publikigitaj de UEA en «Esperanto» el 100 personoj matrikulitaj

en Esperanto-kurso, nur 39 restas ĝis la fino, kaj el ĉiuj nur unu aniĝas al movado. Malfeliĉe, krom tio, ne ĉiuj aniĝintaj al la afero fariĝas aktiva kunlaboranto. Se ni rigardas kun iom da atento al la ĝenerala pejzaĝo de nia movado esperantista, ni ricevas malĝojigan impreson. Ni fiksu, ekzemple, niajn okulojn sur la kongresojn de Esperanto, kaj ni vidos, ke el la esperantistoj oficiale registritaj en la Jarlibro, ĉirkaŭ nur 12% partoprenas aŭ simple aliĝas al la internaciaj kongresoj. En Brazilo, lando, kiu jam venkis dufoje la internacian konkurson de UEA, tiu cifero atingas 13%: el 2.219 brazilaj membroj de UEA 289 plenigis aliĝilon al la Kongreso de la «Rideto-Ŭrbo» (Curitiba).

Ni ankoraŭ ne komprenis la devizon, kiu devas regi la animon de ni ĉiuj: *Unueco estas forto*.

El tiaj fenomenoj originas la malforteco de la E-movado. Efektive, ni estas ankoraŭ tre malgranda kaj ne unuiĝinta popolo, kaj nia voĉo sonas ankoraŭ tro svene, por aŭdiĝi ekstere en la alta mondo. Pro tio la malmultaj triumfoj kaj konkeroj en nia movado baziĝas sur la persona prestiĝo de kelkaj el ĝiaj gvidantoj.

Nuntempe, tamen, multe pli multe ol iam antaŭe, ni bezonas la signiforiĉan influon de la nombro. Ni jam spertis tion per la universala petskribo al ONU kaj ankaŭ la nombro parolos la lastan, la decidan vorton por aŭ kontraŭ ni dum la UNESKO-kunveno en Montevideo.

Ni vivas la epokon de la demokratio, ni devas do ne subestimi la alte signifan influon de la amaso.

Multaj personoj taksas la ideojn laŭ la sukceso, kiun ili vekas ĉe la publiko. Tiu sukceso estas tradukita en ciferojn. Oni rezonas: «Se ne estas milionoj da esperantistoj, tio signifas, ke la lingvo fiaskis.»

Ni jam vidis, ke Zamenhof mem metis la nombbron sur la unuan lokon. Kaj tiu nombro estis, jam en 1887 dek milionoj.

Ni fanfaronas pri 15.000.000 da esperantistoj, sed UEA en 1952 registris nur 16.243 (iom pli ol milono). Tio estas tro malgranda kvanto por *universala* asocio, kiu cetere deziras havi voĉon ĉe UNESKO.

En Brazilo ni jam komencis kompreni la neceson plifortigi la organizitan movadon, tiel vere, ke el la cititaj 16,243 membroj de UEA, 2.219 estas brazilanoj. Tamen kaj ĉefe sur tion ni deziras voki vian atenton, el tiuj 2.219 brazilaj membroj eĉ ne unu kvarono estas anigitaj pere de la esperantistaj asocioj, societoj aŭ kluboj tra la lando: pli ol tri kvaronoj estas senperaj membroj de BEL. Tio montras, ke niaj Esperanto-organizoj, jam efektive tre agemaj, devas tamen iom pli sisteme direkti la varbadon.

Sed direkti la varbadon signifas ne nur anigi novan esperantiston al la movado, kaj forlasi lin en tiu por li tute fremda medio. Oni devas ja restigi, fiksi lin tie, kaj por atingi tion, la societoj kaj kluboj devas mem studi la manieron plej taŭgan, laŭ la socialaj aŭ intelektaj cirkonstancoj de ties respektivaj medioj.

«Ni semu kaj semu konstante» en la kursoj de la lingvo, sed ni ankaŭ «rikoltu kaj rikoltu konstante» el tiuj samaj kursoj novajn anojn por

la movado. Alimaniere ni semas nion, ni simple disjetas plumojn en la venton.

Se ni volas aŭtoritate kaj sukcese pledi por Esperanto kaj ĉe la publiko kaj ĉe la registaroj, ni devas senhalte enflugi en la movadon ĉiam pli grandajn kvantojn da novaj esperantistoj. Kaj apartenas al la filiitaj societoj, plenumi tiun plej gravan laboron, vitalan por Esperanto: varbi, varbi senĉese novajn membrojn el inter ĉiuj tavoloj de la homa socio: laboristojn, profesorojn, advokatojn, kuracistojn, senatanojn, ministrojn, prezidantojn, reĝojn.

Tio, resume, kion ni senpretende deziras starigi antaŭ vi, estas la demando pri la neceso plifortigi la nacian kaj per ĝi la internacian movadon. Varbadi grandskale kaj senĉese, kaj unuigi kiel eble plej solide la erojn de la dise vivanta popolo esperantista.

Belo Horizonte, la 26-an de Decembro 1953.

Luis de Azeredo Coutinho
Aldino Freitas

O PAPA PIO X
Protector dos Esperantistas
CARTÕES POSTAIS
Acabados de chegar
1 Dúzia Cr\$ 25,00

Cursos de Esperanto por
Correspondência

- 1.º grau — Elementar
- 2.º grau — Superior
- 3.º grau — Magistral

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

I EXPOSIÇÃO INTERNACIONAL DE ESPERANTO

Promovida pela Universal Esperanto-Asocio, realizar-se-á em Novembro próximo futuro em Montevidéu, a I Exposição Universal de Esperanto, cujo funcionamento coincidirá com o da 8.ª Sessão da Conferência Geral da U.N.E.S.C.O., que deverá examinar a questão do Esperanto em consequência da grande petição há tempos apresentada à O.N.U.

A Liga Brasileira de Esperanto enviou copioso material para essa importante exposição e também uma bandeira brasileira nas dimensões fixadas pela Comissão Organizadora para os pavilhões nacionais dos 80 países, os quais ali figurarão.

Além disso, a Liga deu conhecimento da Exposição ao Instituto Brasileiro de Geografia e Estatística e à Federação Espírita Brasileira, que têm editado grande número de livros em Esperanto e gentilmente se prontificaram a dar a sua valiosa contribuição.

A Liga já recebeu informação de algumas associações esperantistas que atenderam ao apelo da Comissão Organizadora.

Aos estabelecimentos que têm o nome «Esperanto» ou fabricam artigos com esse nome a Liga dirigiu-se especialmente pedindo que mandem fotografias ou amostras, conforme o caso.

Por parte da Universal Esperanto-Asocio funcionarão como observadores na Conferência da U.N.E.S.C.O. o Prof. Ivo Lapenna, que viajará especialmente de Londres, e o Prof. Manuel Fernández y Menéndez.



Brazila Kroniko

CEARÁ

Fortaleza — Nia samideano Paulo Amorim Cardoso sendis al ni interesan cirkuleron rilate al plano pri evangelia laboro, kiun faras la Amerikaj Sepatagaj Adventistoj, pere de Esperanto. La cirkulero informas, ke en Sankta Francisko de Kalifornio, Usono, okazos Interamerika Adventista Kongreso, kiu uzos la internacian lingvon.

S-ro Amorim Cardoso sukcesis enkonduki Esperanton, kiel devigan studobjekton, ĉe la du lastaj lernaroj en unuagrada adventista lernejo.

RIO GRANDE DO NORTE

Natal — Sekve de klopodoj de la Associação Potiguar de Esperanto, estas starigitaj nedevigaj kursoj de Esperanto en la unuagrada lernejoj — «João Tiburcio», «Isabel Gondim» kaj Augusto Severo».

PERNAMBUCO

Recife — La Sekretario de Edukado kaj Kulturo de la Ŝtato, D-ro Gilberto Osorio de Andrada, konsiderante la gravecon de plialtigo de la kultura nivelo por la instruistaro, per la Ordonon n-ro 14, publikigita en la ŝtata oficiala organo *Diário Oficial* de 9-1-1954, rekomendis al la instruistoj kaj profesoroj interesiĝi por la studo de Esperanto.

BAÍA

Salvador — Associação Baiana de Esperanto sendis entuziasman gratulan leteron al Prezidanto de la Ŝtato Paraná pro lia rimarkinda parolado, okaze de la solena malferma kunsido de la XIV Brazila Kongreso de Esperanto, en Curitiba.

STATO RIO DE JANEIRO

Niterói — En la sidejo de la Kolegio Bittencourt Silva Niterói Esperanto-Klubo inaŭguris novan kurson de Esperanto, kiu daŭros 4 monatojn. Enmatrikuliĝis 20 gelernantoj.

En la sama sidejo N.E.K. solene festis la disdonon de diplomoj al 8 gelernantoj, kiuj kompletigis la elementan kurson faritan dum la lasta duonjaro 1953.

Itaboraí — En la salono de la Urbestrejo Pastro Hugo Rego faras elementan kurson de Esperanto, kies sukceson ni aŭguras.

Itaperuna — La 5-an de Junio 1954 estas solene fondita la grupo «Itaperuna Esperanto-Klubo», dum kunveno, kiun ĉeestis 6-membra delegitaro de Niterói Esperanto-Klubo. D-ro Mário Ritter Nunes, prezidanto de N.E.K. faris aplaŭditan paroladon en la «Grêmio Literário Alberto Torres», pri la temo «La realeco de Esperanto», kaj nia samideano Octávio Viana Peixoto faris en la sidejo de la Komerca Asocio de Itaperuna in-

teresan praktikan demonstracion pri la gramatiko kaj la vortformado de la internacia lingvo de Zamenhof.

La unua elektita estraro de la nova grupo estas: Honora prez. — Abeylard Pereira Gomes; Prez. — Sebastião Rodrigues de Almeida; Vic-prez. — Amour Cesar de Lacerda; Kas. — Ruy de Oliveira Sarandy; la. Sek. — Aurelino José Bernardino; 2.^a Sek. — Antonio Walas Vodopives; Soc. Prop. — Geny Herdy Boechat; Orat. — Emanuel Pereira das Neves. — 32 lernantoj ĉeestis la Esperanto-kurson, kiun gvidis en ĉi tiu urbo niaj samideanoj Olivio Corrêa Pinto kaj Francisco de Assis Torres.

Santanésia — La lecionoj de la Esperanto-kurso farita de la Grupo Verda Steleto de Santanésia estas ilustritaj de lumprojekcioj, per filmstrioj kun teksto Esperanta, ricevitaj de la Esperanto Film-Grupo, el Nederlando.

Verda Steleto donacis al la muzikistaro «Banda Musical 1.^o de Maio» la kompletan partituron de nia himno La Espero.

MINAS GERAIS

Belo Horizonte — La ŝtatestro de Minas Gerais sankciis la leĝon n-ro 1.097 de 18-3-1954, kiu deklaras Esperanto-Societon de Minas Gerais kiel societon de publika utileco. Prezenti la projekton al la ŝtata Deputitaro, kaj ĝin defendis, la klera deputito Bolivar de Freitas.

Juiz de Fora — Kun permeso de Prof. Benjamim Colucci, Direktoro de la Jara Fakultato kaj nia malnova kaj sindona samideano, nia amiko

Kap. Jorge F. Santana organizis Esperanto-kurson por la studentoj de la Fakultato.

PARANÁ

Curitiba — La ŝtata Parlamento konsideris kiel Societon de publika utileco Paraná Esperanto-Asocion, kaj donis al ĝi, kiel helpon, la sumon de 60.000 kruzejoj.

SANTA CATARINA

Florianópolis — Niaj samideanoj Giovanni P. Faraco kaj Eugenio Doin Vieira decidis revigligi la jam de kelka tempo dormantan grupon «Esperantista Klubo de Florianópolis».

La nova sidejo de la Klubo estas ĉe la Komerca Asocio, kie oni faras kurson, ekspozicion, entute propagandan kaj instruan laboradon. Gratulojn al la iniciatintoj kaj al iliaj kunlaborantoj pro la restariĝo de EKF, kiu filiiĝas denove al UEA kaj BEL.

EDZIGOJ

En Porto Alegre, ŝtato Rio Grande do Sul, geedziĝis la 15-an de Majo nia samideano Ivo Sanguinetti kaj F-ino Isaura Rodrigues.

Nia samideano Sylla Magalhães Chaves edziĝis al F-ino Leda Maria Miranda, en ĉi tiu ĉefurbo, je 29 de Majo.

Niaj samideanoj Paulo de Oliveira Ludka kaj Maria do Rosário Pereira geedziĝis en ĉi tiu urbo, je 18 de Junio 1954.

Al la geedzaj paroj niajn sincerajn gratulojn.

APERFEIÇOE O SEU CONHECIMENTO

Eis a tradução do trecho «E demais»,
publicado no número anterior:

TIO ESTAS TRO MULTE

Afrânio Peixoto

Herodoto rakontas, ke la kroko-
diloj de Egiptujo lasas delikatajn
birdetojn — la trokilojn — senĝene
enveni en iliajn faŭkojn, pro la bono,
kiun tiuj faras al ili, sin nutrante per
bestetoj, alkroĉiĝantaj al la mukozo de
ilia buŝo. Nuntempaj naturistoj kon-
firmas ĉi tiun aserton de la antikva
historiisto kaj legitime nomas *Cursorius
egyptius* tiun amikon kaj kun-
manĝanton de la krokodilo.

En la internlando de Brazilo la
anuoj (1) kaj karakaraoj (2) faras
similan servon al la brutoj, purigante
ilian haŭton de vermoj kaj iksodoj
(3). De tia intima reciproka helpado
naskiĝas respekto kaj dankemo.

Kontraŭe al tio, la homoj morti-
gas per pafoj kaj ŝtonoj, kaptas per
viskaĵo kaj enfaligilo, fortimigas per
ĉifonfiguro la birdojn, kiuj en iliaj
plantejoj formanĝas la fiinsektojn.
Tial la insektoj multiĝas kaj de-
truas la plantejojn. Ke la homoj
estas sendankaj, ni toleru: tio apar-
tenas al ilia naturo; sed malsaĝaj, kiaj
estas nek la bovoj, nek la krokodiloj
— tio estas ja tro multe.

No número seguinte daremos, para tra-
dução, um belo trecho do nosso clássico Padre
Antônio Vieira.

(1) En la portugala lingvo «anu»; bir-
deto, science nomata *Crotophaga ani* Lin.

(2) En la port. 1. «caracará»; birdeto,
sc. nom. *Milvago chimachima* Vieill.

(3) En la port. 1. «carrapato». «Iksodo»:
termino, troviganta en la «Enciklopedia Vortaro»
de E. Wuester; ekzemplero de akaroj,
apartenanta al la iksodoj.

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO

Balancete referente ao ano de 1953

RECEITA

	Cr\$
Saldo de 1952	19,30
Assinaturas	5.417,00
Comissões	3.792,90
Congressos	2.108,10
Contribuições	86.382,00
Cursos	7.828,00
Diversas Receitas	3.254,00
Donativos	3.550,00
Livraria	75.259,70
	<hr/>
	187.611,00

DESPESA

Assinaturas	3.187,20
Comissões	2.205,00
Congressos	2.578,10
Cursos	1.710,00
Despesas da sede	2.802,80
Diversas Despesas	1.084,40
Franquia	8.891,30
Livraria	66.109,70
Material de Expediente	7.208,20
Móveis	4.830,00
Propaganda	11.482,00
Quotas	42.291,50
Revista	18.702,20
Serviços de Secretaria	14.527,00
Saldo para 1954	1,60
	<hr/>
	187.611,00

A subvenção federal de Cr\$ 10.000,00,
relativa a 1953, ainda não foi paga.

Rio de Janeiro, 2 de Janeiro de 1954.
— IRANI BAGGI DE ARAÚJO, Tesoureira.



LA MISTERO

ROMANO

**Afrânio Peixoto, Coelho Neto, Medeiros
e Albuquerque, Viriato Correia**

IX

La Voĉo de la Scienco

Ankaŭ li, la viro de la vertoĉapo, kiu estis volvita per la kurteno, ne estis trafita de unu sola el la kugloj pafitaj. Xavier povis do konkludi, ne sen kelka ĝusteco:

— Ĝi okazis same kiel en la usonaj filmoj, terura pafado sed nek mortintoj nek vunditoj.

Li estis apenaŭ dirinta tion, kiam, interrompante la komunikeblan gajecon, kiu estis en la epidermo de la ĉeestantoj, sin prezentis ĉe la pordo du personoj, kies ĉeesto estis nepre necesa, kaj kiuj estis tuj rekonitaj: ili estis D-ro Eneas Cabral, la fama helpa delegito, alnomita la landa Javert, kaj la juna ekspertiza kuracisto, D-ro Teopompo Vasconcelos, pri kies freŝdata konkurso la ĵurnaloj sin okupis dum tuta semajno, kaj kiu estis konsiderata de unuj kiel kapablegulo kaj de aliaj kiel azeno.

La ĉeestantoj alproksimiĝis al la supera aŭtoritatulo, kiu estis tuj informita pri la okazaĵoj de tiu komplikega afero. Li aŭdis ne premata de urĝeco, kun grava mieno, tamen sen priokupateco; nur de tempo al tempo li kunordigis la sekvon de la rakontoj per oportuna demando. Flanke de Melo Bandeira, pri la teknikaj aferoj, li estis la alia subtenilo de la Polico, rilate la sagacecon, la saĝon kaj la decidemon: oni kutime diris, ke Melo kaj lia lanterno estis la novaĵoj de la polica taktiko, la filozofio de Cabral estis la strategio de la publika sekureco. Al la ekspertiza kuracisto li indikis la plenumon de liaj delikataj funkcioj kaj al la kolegoj li klarigis la kialon de sia interveno.

— Mi forkuras el la Centra Policejo, de la ĝenaj telefonadoj, de la gazetaj rapor-

tistoj, kiuj volas la sensacian novaĵon por morgaŭ. Ĉar mi ne povis doni al ili la deziratan novaĵon, ili minacis, ke ili venos ĉi tien por ĉion kompliki: do mi venis antaŭ ili por nia orientiĝo. La Polico, antaŭ la gazetaro kaj la publiko, devas havi nur unu opinionon. Mi bone agis, ĉar ŝajnas, ke estus pluraj opinioj, kaj tio estus la bankroto de la institucio. Dum mi rapide demandas la viron de la vertoĉapo, kaj la ekspertiza kuracisto finas sian juĝon, atendu min unu momenton, por ke ni interŝanĝu niajn opiniojn. Sed, antaŭ tio, ne permesu la eniron ĉi tien al iu gazeta raportisto aŭ fremdulo.

Doninte tiujn ordonojn li komencis en angulo de la salono la preparajn demandojn al la viro trovita malantaŭ la birdotenejo, kies poŝoj estis plenaj de mono.

La ekspertiza kuracisto plenumadis la ritojn de sia profesio. Se la ekspertizo estas la okulo de la juĝopovo, D-ro Vasconcelos, kiu portis okulvitrojn, rigardadis kun duobla avantaĝo; de malproksime kaj poste de proksime li observis, ne tuŝante la kadavron, la vizaĝon de Sanches Lobo, sekve li ekzamenis la ligadon de la ŝnuro ĉe hamaka hoko fiksita sur la trabeto de pordo, kaj fine la alian ekstremon kun la maŝo cirkaŭ la kolo. Li rimarkis la perfektan ordon de la vestoj kaj vidis sur la viktimo nenian signon de lukto, kiu montrus fremdan intervenon en la agon, aŭ reagon de la suferanto. Li ne preterlasis la linion aŭ sulkon ĉe la kolo, kiu ĉesis dekstre ĝuste ĉe la nodo de la maŝo.

La pendigo estis nekompleta, ĉar la pintoj de la piedoj treniĝis sur la planko. Li faris multajn aliajn rimarkojn kaj ridetis, dum li prenis notojn sur peco de papero.

— Kurioza afero, — li diris tra la dentoj — ĝi estos miriga raporto! Mi venĝos min de miaj kalumniantoj. Mi buŝstopos ilin per tiu ekspertizo. Ĉi tiu ulo venĝos al mi la ofendojn.

La helpa delegito samtempe finis la antaŭan demandaron al la viro de la vertoĉapo. Li kunigis en la apuda saloneto kun la kolegoj por plenumi sian jam di-

finitan intencon fiksi orientadon kaj donis la parolon al la delegito Lobato:

— Laŭ mia opinio, la ĉefa ago disvolviĝis ĉirkaŭ la junulino alivestita, rekonita de la servistino kiel F-ino Lucinda, filino de la bankiero, kun kiu ŝi tamen ne loĝis, sed kiu vivtenis ŝin; en la societo de du junuloj, en la nokto de la krimo, en tiuj vestoj, tio falas al ni en la okulojn...

— Mi kontraŭdiras, — interrompis Majoro Melo Bandeira, — tio estas konjektoj: la lanterno estas fakto kaj ĉi tiu letereto ĝia konfirmo. Ĝi estis parenco, jes, kiu tamen eniris ĉi tien sen rompo aŭ perforto agante kun ruzeco... ĝi estis la nevo, Cardoso, al kiu la fianĉino skribis ĉi tiun letereton, kiu falis el lia poŝo kiel atesto. Lanterno kaj letereto, — konkludis la majoro-detektivo.

— Parolu nun la jurmedicino, post la leĝoscienco kaj la scienca polico: ĝi estas nun ĝia vico.

Ĉiuj sin turnis al D-ro Vasconcelos.

— Sinjoroj, nek junulino alivestita en la societo de junuloj, nek nevo aŭ fianĉino, kiu skribas leteretojn; — li faris misteran paŭzon, por turni ĉiujn atentajn sur sian juĝon, kaj malrapide alparolis: — La bankiero Sanches Lobo sin memmortigis...

Kia konsterno! La majoro, same kiel la delegito, abrupte sin ĵetis sur la kusenseĝegojn. Nur Cabral post unu momento, reakirinte la serenecon, demandis:

— La pruvoj, doktoro?

La ekspertizisto pounue nombris ilin: la pendigo apartenas al la okazaro de la memmortigo; nur la infanoj kaj maljunuloj, pro malsupero de fortoj, sin lasas pendigi; nur kelkaj krimuloj, per ruzaj procedoj, sukcesas pendigi sanan viron, sed tio postlasas signojn de luktado: nu, la bankiero estis forta kaj li prezentas nenion, kiu signifas reziston. — Kaj li amasigis pruvojn sur pruvojn de sia aserto. Ne estis ia dubo al li: ĝis estis nur memmortigo...

Eneias Cabral forviŝis la frunton malsekan de ŝvito. Superregante la emocion, li parolis:

— El ĉiuj specoj de vero, la religia, la scienca, la socia, la ŝteta, estas la polica vero, la nia, la plej relativa. Gardu, mia juna kamarado, viajn konvinkojn, sed

ne estu maldiskreta — de nun mi trudas al vi la tenadon de la sekreto de la justeco — kaj lasu breĉon al la ebla murdo por pravigi niajn esplorojn. La publika sekureco postulas laborajn procedojn, ne rapidajn konkludojn. Memmortigo, ziti! ĉio finita! Tio ne povas esti! Ni devas almenaŭ eltrakti la trovitajn postsignojn — la junulinon alivestitan, de D-ro Lobato; la letereton de la fianĉino de la nevo, de Majoro Bandeira, kaj precipe tiun ulon de la vertoĉapo, kiun mi prenas sur min.

Li paŭzis kaj kvazaŭorakole daŭrigis:

— Ju pli mistera estas iu krimo, des pli urĝa estas por la polico la eltrovo de la kulpulo. Se ĝi ne lin trovas, ĝi nomas iun priresponda. De tiam la individuo zorgu sin defendi. La publika trankvileco ne povas resti sub la arbitro de krimuloj liberaj. La polico ne plenumus sian mision, se ĝi ne kaptus tuj iun pekportan kapron. Kapro estas dirmaniero. Cetere, la juĝantaro absolvos lin kiel ordinare kaj juĝistaro, polico kaj publika sekureco ĉio sin aranĝos bone. Nu, sinjoroj, en ĉi tiu afero la ulo estas trovita: li estas la viro de la vertoĉapo. Por kompliki la aferon, por doni al ĝi sensacian kaj misteran aspekton, estas la krimo aŭ la pasia kunkulpeco, estas Cardoso, la nevo, estas F-ino Lucinda, la filino, kiun ni ne povas malatenti. Embarasiĝantaj en tiuj postsignoj per niaj diversaj kapablecoj, ni tamen ne forgesu la direktadon, kiun al la gazetaro scivolema pri ĉiuj tiuj policaj mizeroj, ni devas doni... liveri al ĝi la privatan vivon de Sanches Lobo... Ĉu li mortis? Ni sciu kiel, kaj kiu mortigis lin, se efektive li ne sin memmortigis; pretekstante doni informon al la publiko, oni malbonfamigu lin en la informfakoj. La akvo de la lavado de tiu malpura tolaĵo lavos al ni la sangon de la krimoj...

Bandeira kaj Lobato estis aplaŭdantaj tiujn bombastajn vortojn, kiam la raportistoj frapis ĉe la pordo. La helpa delegito ordonis, ke oni malfermu ĝin.

— Sinjoroj, oni murdis la bankieron Sanches Lobo por lin ŝteli; la murdinto, dank'al la sagaceco de la polico, estas arestita. Sensaciaj faktoj estas enmiksita: fi-



O ESPERANTO NO ESTRANGEIRO



ALEMANHA — Como a seu tempo foi bem noticiado pelos periódicos esperantistas e nacionais, durante o ano de 1952 a jovem esperantista alemã Siglind Erica Schmalzriedt, de 14 anos de idade, viajou só, por tôda a Europa, e graças ao conhecimento do Esperanto encontrou por tôda parte cordial aceitação e boa proteção. Sinjo (como a conhecem os esperantistas), descreveu suas viagens, em livro publicado em alemão, estando já quase pronta a edição em Esperanto.

ARGENTINA — Na cidade de Alvear, província de Mendoza, foi inaugurada a rua Dr. Zamenhof, a primeira no país com o nome do autor do Esperanto.

CHECOSLOVAQUIA — Nossos samideanos de Praga continuam a editar, de vez em quando, seu boletim esperantista, mimeografado, cuja leitura mostra o esforço em favor da língua internacional. Por meio de reuniões e de cursos o Esperanto continua a viver e progredir em Bratislava, Martin, Poprad, Koshice e outras cidades.

Na cidade de Olomouc fundou-se o "Cigana Esperanto-Klubo", o primeiro clube cigano esperantista, sob a direção de Moimir Anush.

CHINA — Em Pequim foi posta à venda a segunda edição do Dicionário Chinês-

Esperanto, sob a direção do linguista Ven Lo Fun. Consta o volume de 936 páginas e inclui todos os neologismos usuais.

ESPANHA — O Reitor da Universidade de Saragoça, Sr. Miguel Sandro Izquierdo, antigo esperantista, aceitou ser membro honorário do XV Congresso Espanhol de Esperanto, e ofereceu os salões da Universidade e da Faculdade de Medicina para a sessão solene de abertura e para as sessões de trabalho.

O Diretor Geral dos Correios permitiu o uso de um carimbo postal especial, com texto sôbre o Congresso, durante os dias de sua realização, tendo resolvido também estabelecer um pôsto na sede do Congresso.

ESTADOS UNIDOS — A biblioteca da Casa Branca, residência oficial do Presidente dos Estados Unidos da América do Norte, possui edições da Bíblia em 78 línguas, entre as quais o Esperanto.

FRANÇA — *Paris* — Na Sorbonne, as conferências em Esperanto se sucedem, cheias de interêsse, sob a direção esclarecida do Sr. Belhoste. De 14 de Maio a 25 de Junho houve 7 conferências: *Universaleco de la penso, Kiel fariĝis Norman-daj Rakontoj, Esp. travivaĵoj, Pri ne jam konata temo, La kazo de la poŝta veturilo de Lyon, Evoluo de la konstruado kaj Mia unua parolado*, respectivamente pelos Srs. Dessoit, Dupuis, Lagarde, Poly, Dabiezis, Longue Epée e Dalfort.

Pax Christi — O movimento *Pax Christi* fez saber que Monsenhor Feltin, arcebispo de Paris, resolveu criar nessa associação uma secção de correspondência internacional esperantista.

HOLANDA — "*Scienca Revuo*" em seu n.º de Novembro noticia o falecimento, em Agosto de 1953, e com a provecta idade de 94 anos, do cientista holandês, de repu-

lino de la mortinto, vestita kiel viro, iu nevo, kiu perdis kompromitan letereton... Dum la enketo la gazetaro havos la kutiman kunhelpon. Mi liveras al vi la privatatan vivon de la viktimo, por ke vi faru severan esploron...

PIO X E O ESPERANTO



tação internacional, Prof. Dr. A. F. Holleman, cujos compêndios de química são bem conhecidos entre nós, em tradução portuguesa. Esperantista dedicado e competente, Holleman nunca deixou de ter, na estante de livros de química de seu laboratório, livros escritos em Esperanto, para lê-los de vez em quando. Fez parte de UEA e de ISAE (Associação Científica Internacional de Esperanto), tendo trabalhado a favor desta lingua na Academia de Ciências e na Sociedade Química da Holanda.

ITALIA — Na cidade italiana Vallio (provincia de Brescia) há uma fonte de água mineral, com virtudes curativas para doenças dos rins e do figado. Na entrada da fonte foi colocada uma escultura em relêvo, trabalho de nosso samideano Gino Casari, com a inscrição: "*Fonto de Sane-co*". As garrafas de água dessa fonte trazem um rótulo com a gravura da escultura e da inscrição em Esperanto da "fonte de saude".

JAPÃO — Com o fim de estabelecer contacto e colaboração com os médicos de todos os países, organizou-se em Tóquio a Associação dos Médicos Esperantistas. O novo sodalicio, que reúne cerca de 400 profissionais, resolveu editar a revista médica "*Medicina Revuo*", em Esperanto.

O Beato Papa Pio X, canonizado a 29 de Maio dêste ano, foi sempre amigo e benfeitor do Esperanto. *Do Boletim de la Federacion Esperantista Española*, de Março, damos abaixo um resumo do artigo "Un grande amigo del Esperanto, en los altares":

"A 27 de Junho de 1906, Pio X dirigiu uma mensagem ao Padre Emile Peltier, com sua benção papal ao movimento esperantista católico e ao Padre Peltier, fundador de *Espero Katolika*, o primeiro periódico esperantista católico.

A leitura dessa mensagem, em uma das sessões do Segundo Congresso Universal de Esperanto, em Genebra, em 1906, provocou uma tempestade de aplausos, calorosamente secundados pelos congressistas não católicos.

O órgão do Vaticano *L'Osservatore Romano*, em sua edição de 23 de Setembro de 1951, publicou longo artigo do Padre Gabrielle M. Roschini, sob o título "O Beato Pio X e o Esperanto", no qual se lê: "Os esperantistas, que já são centenas de milhares, espalhados por tôdas as partes do mundo, recordarão com viva satisfação o juízo benévolo e previsor do Beato Pio X: "Vejo no Esperanto um valioso meio para manter a unidade dos católicos de todo o mundo".

Por nossa parte, acrescentamos que a mensagem de Pio X foi lida no Congresso de Genebra pelo pastor protestante suíço Sr. Fr. Schneeberger, o que prova a absoluta neutralidade do Esperanto. E o Dr. Carlo Bourlet disse então que, como livre-pensador, chamava fortemente a atenção do Congresso para essa importante aprovação de Pio X ao Esperanto, e instava para que se pudesse receber semelhante aprovação de outras religiões e doutrinas, o que mostraria a evidência da neutralidade do Esperanto.

BRAZILAJ KOMITATANOJ DE UEA


Brazila Esperanto-Ligo enskribas en Universala Esperanto-Asocio pli ol 2.000 membroj kaj tial laŭ ties Statuto rajtas esti reprezentata de 3 membroj en la Komitato de nia tutmonda organizaĵo. Ĝis nun B.E.L. havis nur unu reprezentanton, aŭ komitatano.

Pro la pligrandiĝo de la membraro B.E.L. devis elekti du novajn komitatanojn. La elektitoj estas D-roj Mi-

cieton de Minas Gerais kaj plej lerte estris la organizon de la XII-a Brazila Kongreso.

Se nia lando venkls je du sinsekvaj fojoj en la Internacia Konkurso, B.E.L. ŝuldas grandparte al tiuj du senlacaj batalantoj sian sukceson. Ilia elekto estas do dankesprimo de B.E.L.

Restas kiel Komitatano D-ro Carlos Domingues, Katedra Profesoro ĉe la Universitato de Brazilo kaj Prezidanto de B.E.L., kiu de 1935 plenumas tiun gravan funkcion, plenan de respondeco.



D-ro C. Domingues



D-ro M. Timponi



D-ro L. A. Coutinho

guel Timponi kaj Luís de Azeredo Coutinho.


D-ro Miguel Timponi, eminenta juristo kaj eks-Sekretario (Ministro) de la Internaj Aferoj kaj Sekureco de la Federacia Distrikto, estas Prezidanto de la veterana Brazila Klubo «Esperanto», en Rio de Janeiro.

D-ro Luis de Azeredo Coutinho, klera kaj sindona kuracisto en Belo Horizonte, kie li direktas konatan kuracejon, prezidis dum jaroj Esperanto-So-

La landoj, kiuj enskribis pli da membroj en UEA dum la jaro 1953, laŭ statistiko aperinta en la numero de Marto 1954 de la gazeto *Esperanto*, estas jenaj:

Brazilo	2.240
Svedujo	1.831
Britujo	1.719
Francujo	1.456
Italujo	1.207
Danujo	1.179

Bibliografio



MARIO RITTER NUNES — *Gramática sinóptica de Esperanto* — 33 p. Rio de Janeiro, 1954.

La aŭtoro faris interesan verkon, kompilante, organizante sinoptikajn tabelojn gramatikajn, ekde la alfabeto kaj prononco, al ĉiuj vortklasoj, ĝis la vortfarado.

La libro montras unuavide la simplecon kaj flekseblecon de Esperanto. Nia sindona samideano meritas laŭdon, pro tiu bonega ilo propaganda.

D-RO PAUL NEERGAARD — *Atakoj Kontraŭ Ĝardenplantoj kaj kiel prilukti ilin*. 1 vol. bele bindita, 234 paĝoj kun multaj bildoj kaj 9 tabuloj en koloroj. 1954, lukse eldonita de The Esperanto Publishing Co. Ltd., Anglujo. La unua verko en Esperanto, kiu pritraktas temojn de hortikulturo, plantpatologio kaj plantdamagaj insektoj. Bonega, interesa libro por ĉiu, kaj aparte utila por ĝardenamantoj, ĝardenistoj kaj propagandistoj de nia lingvo.

VLADIMIR DEDIJER — *Josip Broz Tito*. Biografiaj notoj. Tradukis Mason Stuttard. 1 vol. bindita, 523 paĝoj, kun

multaj ilustraĵoj. Eldonis Slovenia Esperanto-Ligo, Ljubljana, 1954. Ĉi tiu bela, rimarkinda verko prezentas la vivon de la nuna Prezidanto de Jugoslavujo, kiu dum la lasta mondmilito fariĝis tutmonde konata.


LA IMITADO DE KRISTO, de Thomas à Kempis. Esperantigita de Frato Wigbertus Van Zon L.K., kun aprobo eklezia. 1 vol. bindita, 335 p; Nederlanda eldono.

Traduko klara, leginda, de genia verkulo, kiu havas universalan famon, originale skribita en la latina lingvo, en la jarcento XV-a. Kompilado de piaj, moralaj, religiaj pensoj kaj meditoj, jam tradukita en nombrajn idiomojn, de pluraj verkistoj, proze kaj verse.

FAKTOJ PRI NORVEGUJO — Kopirajto de Chr. Schibsteds Forlag, Oslo, 1953. 64 paĝoj. Oficiala Esperanta eldono de informilo pri Norvegujo, kiu jam aperis en la angla lingvo. Faktoj kaj Statistikoj pri ĉio koncernanta Norvegujon: la lando, administrado, defendaj fortoj, eklezio, edukado, sanitara kaj sociala sistemoj, komunikiloj, ekonomio ĝenerala, kultura vivo, sportoj, kiu estas kiu (famaj nomoj el nuna kaj pasintaj tempoj) kaj fine la nacia himno kun la Esperanta traduko.

Nederlando	1.096
Norvegujo	939
Jugoslavujo	844
Belgujo	753
Usono	632
Hispanujo	513

LU SIN — *Sovaĝa herbaro* Elĉinigi S.J. Sü 1951. Ŝanhaja Esperantista Ligo. Shanghai. 65 paĝoj, kun mallongaj literaturaj fantaziaĵoj, verkitaj de la aŭtoro dum la jaroj 1924-26. Ĝrabra legado, pro la klasika stilo de la traduko.



Recenzo

HISTORIO DE S. A. T. — 1921 — 1952 — Eldono de Sennacieca Asocio Tutmonda — 67, avenue Gambetta, Paris — 20 — 1953. 1 vol. 152 p. 13 x 19,5 cm. broŝ.

La prezento de la libro tuj kaptas nian atenton kaj vekas simpatian: bonega papero, bela presaĵo, dek tri kliŝoj, multe da aero inter la temoj kaj linioj.

Lanti kaj liaj kunlaborantoj de la unua horo estis ĝismedolaj esperantistoj, por kiuj la naciaj lingvoj estas nur helplingvoj de la homara lingvo Esperanto. Konversacii aŭ korespondi per nacia lingvo ĉe inicitoj en Esperanto estas peko kontraŭ la sennacieca ideo de tiaj fervoruloj.

S.A.T. estas ne nur Asocio, sed ĉefe filozofia skolo, ideologio de homoj, por kiuj la internacia lingvo Esperanto

estas standardo gvidanta la homaron al venko kontraŭ la malfeliĉiga naciema ŝovinismo. Kaj ili venkis sian batalon; ili kreis por multaj homoj tiun kredon kontraŭ naciismo kaj favore al tutmonda paco. Ne gravas diskuti ilian ideon, sed nur konstati, ke ĝi estas ekzistanta fakto: ekzistas tiu skolo kreita antaŭ 30 jaroj de Lanti, kaj dum ĝi ekzistos, Esperanto ne povos pereii.

Ĉi tiu libro montras al ni tiun venkon de la SATanoj; ja malfacila venko, sed eternigita per dekoj da gravaj libroj, kies liston ni trovas en la libro.

Inter tiuj verkoj ni devas mencii tri klasikaĵojn al ni ĉiuj nepre necesajn: 2 volumojn da «*Leteroj de L. L. Zamenhof*» kaj la volumon jam en kvara eldono «*Plena Vortaro de Esperanto*». Ĉi tiu lasta, dank'al al sia bonega aranĝo kiel gramatika vortaro, fariĝis la gvidanto de ĉiu esperantisto kaj konservanto de la unueco de nia lingvo. Ĝi plenumas nun la taskon de nia «*Fundamento de Esperanto*», dank'al multegaj ekzemploj pri la uzado de ĉiu afikso, prepozicio, verbo k.a. vortoj. En ĝi estas granda frazaro por gvidi la verkistojn.

En la unua tempo S.A.T. estis forte maldekstrema kaj ruĝe socialisma kontraŭ ni, ĉiam alnomataj «burgaĵj»

LIU BEJU — *Fajrolumo en la fronto*. El la ĉina lingvo tradukis S.J. Sü, 1951. Ŝanhaja Esperantista Ligo. Shanghai. 148 paĝ. Impresigaj priskriboj pri marŝadoj, bataloj, ĉiuspecaj okazintaĵoj dum la ĉina milito en la jaroj 1948-49, travivitaj persone de la aŭtoro. La bonega Esperanta traduko de Sü igas legindaj ĉi tiujn kronikojn.

esperantistoj en ĝiaj gazetoj, sed iom post iom ĝi fariĝis pli kulturema kaj malpli politika. Nun ĝi havas Literaturan Komitaton, kiu kontrolis la lingvotiron de S.A.T.» kaj meditu pri la von de la tre mistika libro «La Homaro kaj la Mondbildo», de Martinus, kaj similajn nur Esperantajn verkojn. Niaj interrilatoj estas jam tute fratecaj.

La eldonfako de S.A.T. sufiĉus por eternigi en la mondo nian lingvon.

Ĉiu samideano atente legu la «Hiszekzisto de tia forta ideologio naskita de Esperanto, Laŭ Waringhien, la ideologio de S.A.T. kaj la originala poezio en Esperanto sufiĉas por trudi al la mondo nian lingvon.

I. G. B.

NEKROLOGO

INÁCIO MATOS QUINAUD

Ni eksciis sen detaloj pri la morto tragika de nia samideano Inácio Matos Quinaud, en Pirapora, Minas Gerais.

Li estis Membro Subtenanto de nia Movado kaj kompetenta esperantisto.
Cr\$

JOÃO NEVES PIAUÍ

En la 5-a de Majo lasta mortis en Salvador, Baía, nia samideano D-ro João Neves Piauí, Membro Subtenanto de nia Ligo kaj de UEA.

Vigle li propagandis nian lingvon en tiu urbo, kie li funkciis de kelkaj jaroj kiel supera oficiŝto de la Konta Kortumo.

ÚLTIMAS NOVIDADES

	Cr\$
IMITADO DE KRISTO, tr. de Fr. Wigbertus Van Zon L. K. Enc. simples 55,00.	
De luxo	70,00
BIOGRAFIO DE TITO, Vladimir Dedijer, tr. de Mason Stuttard. Enc.	160,00
ATAKOJ KONTRAU GARDENPLANTOJ, Paul Neergaard. Enc.	130,00
GRAMÁTICA SINÓPTICA DE ESPERANTO, Mário Ritter Nunes	18,00
SERVIÇO DE LIVROS DA LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO	

EDIÇÕES PORTUGUESAS

Vivo de Zola	30,00
Galileo Galilei	25,00
Vivo kaj Arto de Goya	7,00
Historio de Usono	7,00
La Prahistoria Arto	7,00
La Budhismo	7,00
Vivo de Nansen	7,00
La Portugala Literaturo...	7,00
Vivo de Passarro	7,00
Pro Tri Pingvenaj Ovoj ...	7,00
Historio de Nederlando ...	7,00

SERVIÇO DE LIVROS DA BEL

ANONCETO

— ENIO HARAGUTCHI — Rua Teodoro Sampaio, 2621, apto. 13, São Paulo, BRASIL — Deziras korespondi kun geesperantistoj de tuta mondo per leteroj kaj poŝtkarkoj.